## Eŭropa vojaĝo (1930-1932) de SUZUKI Masao: retrospektivo per fotoj

La 113-a Japana Esperanto-Kongreso
2026-10-04
Chiba, Japanio

GOTOO Hitosi



## resumo



En 1930-32, SUZUKI Masao (1899-1981; vicprofesoro ĉe la Medicina Univ. de Chiba, poste profesoro ĉe la Univ. de Chiba; bopatro de SUZUKI Masumi) profitis la tempon de ŝtat-paga gast-esploristeco en Lejpcigo, Germanio, por vojaĝi tra Eŭropo kaj interkonatiĝi kun esperantistoj, partoprenante interalie en la 23-a UK (Krakovo) kaj la 24-a (Parizo). Ni retrospektive sekvu la scenojn per centoj da fotoj.



## Aldone: Simpozio
La akcepto de Esperanto en Japanio: el la vidpunkto de turismo

https://subsite.icu.ac.jp/iacs/symposium/post-76.html

Simpozio organizita de la Instituto pri Azia Kulturo, Internacia Kristana Universitato (Mitaka, Tokio)

2026-10-31 (sab.)　14:00 - 18:00
Reale kaj rete
anticipa registrado postulata




## enhavo

1. Esperanto kaj turismo
2. Suzuki Masao
3. Ŝtat-paga gast-esploro
4. Esperanta vojaĝo tra Eŭropo de Suzuki
5. Konklude



## 1. Esperanto kaj turismo (kaj komerco)

1887 La Unua Libro
1889-09 *La Esperantisto* (Nurenbergo)
1-a ekstermovada reklamo ("poŝtsignoj estas aĉetataj") jam en N-ro 2 (1889.11)

Anonco en Jaro 5, N-ro 12 (1894.12)

Al ĉiuj personoj **bone parolantaj en la lingvo Esperanto kaj laborantaj por ĝia vastigado**, kiuj deziras viziti Krimon, mi volonte proponas **gastamon en mia domo** kaj mi ankaŭ kun plezuro penos plenumi ĉiajn komisiojn de ĉiuj veraj amikoj de Esperanto.
Doktoro I. Ostrovski en Jalto, Rusujo



## 1. Esperanto kaj turismo (kaj komerco)

1905 La 1-a UK
1906 Komenco de la organiza movado en Japanio: Fondo de Japana E-ista Asocio, ekapero de la organo *La Japana Esperantisto*. La 1-a JK. La unua lernolibro kaj aliaj libroj.

La 1-a ekstermovada reklamo en Vol. 1, N-ro 6

Pri kia komercaĵo temas?

## 1. Esperanto kaj turismo (kaj komerco)

1906 *La Japana Esperantisto*

La 1-a ekstermovada reklamo en Vol. 1, N-ro 6



JAPANA SYOYU (Saŭco)

La plej bona kaj pura saŭco farata en Japanujo. Donita multaj premioj kaj medaloj en ekspozicioj enlandaj kaj universalaj. Kun tiu ĉi SYOYU, viandoj, fiŝoj kaj legomoj rositaj kaj bolitaj estas servotaj tre frandeme. Sin turnu por katalogo, libreto kaj specimeno al

GEMBA TANAKA,
FARISTO
CHOSHI, CHIBAKEN, JAPANUJO.



## 1. Esperanto kaj

Plenpaĝa reklamo sur la dorsopaĝo de multaj numeroj de *La Japana Esperantisto* post 1908

Vol. 5, n-ro 2-3 (1910.2-3)

Cetere temas pri frua provo de esperantigo de japana vorto: ŝojo



JAPANA ESPERANTISTO

LA PLEJ BONA JAPANA ŜOJO
"HIGETA SHOYU"

ヒゲタ最上醤油

Kuiristino diras: Kuirejo, kiu ne tenas "Higetan" ne liveras bongustan manĝajon!

GEMBA TANAKA, ĈOŜI, ĈIBAKEN.

Sin turni al:
Sola Agento Eksporta, HOLST & KO, 200 Jokohama (Japanujo).
Specimeno kaj katalogo riceveblaj senpage.

## 1. Esperanto kaj turismo (kaj komerco)

1923.4.2-5 Internacia Konferenco de komercaj ĉambroj, specimenaj foiroj, ekonomiaj organizaĵoj kaj turismaj oficejoj (Venecio), sub la iniciato de E. Privat (kun helpo de Yanagita Kunio)
japane: 商業共通語に関する商業遊覧業会議

Landoj reprezentitaj: 27

6 ministrejoj, 87 komercaj ĉambroj, 21 foiroj, 52 unuiĝoj bankaj, industriaj, profesiaj kaj eksportaj, [...] 30 turismaj kaj porfremdulaj korporacioj, [...] - 209

"A remarkable feature of the Conference was the number of delegates who had learned Esperanto purposely to take part in it [...]"
*Report of the delegate of the London Chamber of Commerce*



## 1. Esperanto kaj turisn




1927 *Gvidlibreto por Japanlando*
37 ilustraĵoj, 9 landkartoj

Tradukita de la redakcio de Japana Esperanto-Instituto. Eldonita de Japana Ministrejo de ŝtat-fervojoj, Tokio. 5000 ekzempleroj

"Bela, lukse eldonita libro, kun ĉiuj utilaj kaj necesaj informoj por vojaĝantoj al Japanlando. Multaj fotografaĵoj ilustras la tekston, kaj ankaŭ kelkaj landkartoj kaj urboplanoj plivalorigas tiun belegan gvidlibron. " — *Bulgara esperantisto*



## 1. Esperanto kaj turismo

1940 井上万寿蔵『観光読本 観光事業の理論と問題』 (INOUE Masuzo, Kankoo Tokuhon) *[Legolibro pri turismo: Teorio kaj problemoj en turismaj servoj]*

Unua kleriga libro en Japanio pri turismologio, verkita de fervoja burokrato-esperantisto!

Ekonomia celo de turismaj servoj: mongajno

Spiritaj kaj kulturaj celoj de turismaj servoj (pli altnivelaj): enkondukante turistojn en la regionon/landon, diskonigi al ili cirkonstancojn kaj karakterojn de la regiono, kaj plue estigi reciprokan amikan etoson. [resumo de Gotoo]



## 1. Esperanto kaj turism

YAMAGUCHI Makoto, *Turismon forgesinta Japanio*, 2026

Multaj mencioj al Inoue lige kun Esperanto, ekzemple:

"En *Legolibro pri turismo* de Inoue, liaj eksterlandaj spertoj kaj scipovo de Esperanto estas plene utiligataj diversloke." (p. 48)



## 2. SUZUKI Masao (1899.9.8-1981.8.13)

**鈴木正夫**

1899 Nask. en Nagojo

1917 Eniris en la 1-a Nacia Kolegio, Tokio, ekkonis E-on de samĉambrano INOUE Masuzo, kaj eklernis en 1921

1924 Finis universitaton kaj fariĝis asistanto de la fiziologia laboratorio, Imperia Univ. de Tokio

1927 Vicprofesoro pri fiziologio ĉe la Medicina Univ. de Chiba (1949 Univ. de Chiba)

1930–32 Ŝtat-paga gast-esploristo en Germanio

1934 Doktoro pri medicino

1935 Profesoro (ĝis la emeritiĝo 1965)

1962-64 Dekano de la Medicina Fakultato, Univ. de Chiba



## 2. SUZUKI Masao

1927 Vicprofesoro pri fiziologio ĉe la Medicina Univ. de Chiba

1930–32 Ŝtat-paga gast-esploristo en Germanio

1935 Profesoro ( -1965)

1939-70 Estrarano de JEI

1951 Ĉefredaktoro de *Medicina Revuo* (poste *Medicina Internacia Revuo*)

1962-64 Prezidanto de UMEA

1965 Prelego "elektro kaj vivaĵo" en Internacia Somera Univ. (50-a UK, Tokio)






## 2. SUZUKI Masumi
(1938.10.04 – 2016.05.04)



**鈴木ますみ**, Profesie instruistino pri Kemio.

1938 Nask. en Tajvano, en E-ista/medicinista familio, kiel filino de NAKAYAMA Tomoo (1909-1989), bofilo de NISI Seiho (1885-1978), dum la vicprofesoreco de la patro ĉe la Imperia Univ. de Taihoku (Tajpeo)

1958 formale eklernis E-on

1965 Edziniĝis al SUZUKI Kunio, filo de SUZUKI Masao, disĉiplo de Nisi kaj amiko de Nakayama

1970-aj jaroj Loĝis en Okayama, instruis en la mezlernejo Sanyoo kaj organizis kaj longe gvidis E-klubon, kies E-aktivado daŭras nun

1992 Forlasis Okayama kaj ekloĝis en Tokio. Poste estrarano de JEI ĉefe en eduka fako



## 3. Ŝtat-paga gastesploro

Post la moderniĝo la japana registaro invitis alilandajn specialistojn al diversaj institucioj kontraŭ tre alta salajro.

De la fino de la 19-a jc., la Eduka Ministerio sendis universitatanojn k.a. ŝtatpage ĉefe al Usono kaj Eŭropo. Aliaj ministerioj havis similan sistemon por sendi siajn teknikistojn, altrangajn oficistojn k.a.. Tiun privilegion ĝuis nombro da esp-istoj, ekzemple:

1922-24 AZUMA Suehiko; 1924-28 ESAKI Teizoo

1926-28 KODERA Renkiti; 1930-32 SUZUKI Masao

Ministerio de ŝtat-fervojoj:

1925-27 OSSAKA Kenĵi; 1931-33 INOUE Masuzo



## 3. Ŝtat-paga gastesploro

En la kazo de Suzuki:

Fakte la vojaĝo estis du-kaj-duonjara k ĉirkaŭ-tergloba:

1930-04-10 Ŝipa ekveturo de Kobe (04-17/18 Ŝanhajo, 04-24 Singapuro, 04-26 Penango, 05-01 Cejlono, 05-12/13 Kairo, Parizo, 05-27/30 Berlino

1930-05/1932-04 Restado en Leipcigo en la fiziologia laboratorio, Univ. de Lejpcigo sub prof. Gildemeister. Partoprenoj en fiziologiaj konferencoj diversloke.

1932-09-08 Ŝipa ekveturo de Ĉerburgo, Francio

1932-09-14 Novjorko (fervoje tra Sankta Luiso)

1932-09-24 Ŝipa ekveturo de San-Francisko (Honoluluo)

1932-10-11 Reveno al Jokohamo

## 4. Esperanta vojaĝo tra Eŭropo de SUZUKI

UEA-membrokarto de Suzuki (1929)


Loko por fotografaĵo

Certigo por la aŭtentikeco de la fotografaĵo kaj de la subskribo de:

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

Membro № 32978

S-ro Masao Suzuki

TIBA

1929

La Prezidanto de UEA: D-ro Edmond Privat

La Direktoro de UEA: Hans Jakob

## 4. Esperanta vojaĝo tra Eŭropo de SUZUKI

1930-05/1932-04 Restado en Leipcigo
dum la preskaŭ 2-jara restado, oftaj partoprenoj en loka E-grupo, vizitoj al germanaj urboj k renkontoj kun esp-istoj
1930-06 la 19-a Germana E-Kongreso (Dresdeno)
1931-05 la 20-a Germana E-Kongreso (Hamburgo)
1931-08-01/08 la 23-a UK (Krakovo); postkongrese al Varsovio k Bjalistoko, poste al Hungario k Aŭstrio
1931 jarfine al Suda Francio k Italio
1932-05 Utreĥto, Bruselo, Kembriĝo, Londono
1932-07-30/08-06 la 24-a UK (Parizo), saluto nome de Japanio
1932-09-08 Ŝipa Ekveturo de Ĉerburgo
1932-09-14 Novjorko (Renkonto kun INOUE Masuzo)
1932-09-24 Ekveturo de San-Francisko
1932-10-11 Reveno al Jokohamo

19

## 4. Esperanta vojaĝo tra Eŭropo de SUZUKI

Du japanlingvaj artikoloj pri la vojaĝo:

・「緑の友を求めて」(Serĉe al verdaj amikoj)
*La Revuo Orienta* 1930.8, 1930.9

・「欧州エス界諸名士の印象」
（Impresoj de eminentuloj en Eŭropa esperantujo）
*La Revuo Orienta* 1933.3, 1933.5

20

## 4. Esperanta vojaĝo tra Eŭropo de SUZUKI

Lian vojaĝon karakterizas la ekzisto de granda nombro da fotoj. Li mem praktikis fotografian teknikon kaj dum la vojaĝo li fotis pli ol 500 fotojn kaj aranĝis ilin laŭteme en 6 mane faritajn albumojn, kiujn mi akiris en aŭkcio.

23-a UK (kun Lidia Zamanhof)





24-a UK (internacia balo)

21

## 4. Esperanta vojaĝo tra Eŭropo de SUZUKI

La fotoj temas ĉefe pri personoj (multope, kelkope, malofte unuope) sed ankaŭ pri turismaj lokoj k eventoj, kaj fojfoje pri naturaj pejzaĝoj.
Laŭteme aranĝitaj en ses albumojn:

1 Albumo de Eŭropa vojaĝo『游欧写真帳』Iro (1930.4–5) 47 fotoj
2 Leipcigo (1930.5–1932.4) 98 fotoj
3 UK en Krakovo k postaj vojaĝoj (1931) 114 fotoj
4 Interamikiĝo kun esp-istoj en k ĉirkaŭ Leipcigo 62 fotoj
5 Scenoj en Germanio 129 fotoj
6 Vivo en Britio Revenvojo (1932.5–10) 101 fotoj

22








LEIPZIG
DIE
STADT
DES
ライプチヒ




クラコウ






TEKA 集会


WIELICZKA - 7 VIII 1931






ザメンホフ・墓


ブダペシュト




PER
LIBERA
VOJO


ベルリン















## Konklude

En 1930-32, SUZUKI Masao plenplene profitis la tempon de ŝtat-paga gast-esploristeco en Lejpcigo, Germanio, por vojaĝi tra Eŭropo kaj interamikiĝi kun esperantistoj diversloke.

Esperanto estis por li vere utila ilo por fari lian stud-vojaĝon rimarkinde bunta. Danke al multnombraj fotoj ni povas observi la scenojn kaj kundividi liajn agrablajn spertojn.

47

## Aldone: Simpozio La akcepto de Esperanto en Japanio: el la vidpunkto de turismo

https://subsite.icu.ac.jp/iacs/symposium/post-76.html

Simpozio organizita de la Instituto pri Azia Kulturo, Internacia Kristana Universitato (Mitaka, Tokio)

2026-10-31 (sab.) 14:00 - 18:00

Reale kaj rete

anticipa registrado postulata

